


**ROK XXIV.
PAŹDZIERNIK
N-r 10.**



**JARO XXIV
OKTOBRO
N-o 10.**

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Pejzaĝa motivo el Ojców kuŝanta tuj apud Kraków; celo de unu el venontjaraj dumkongresaj ekskursoj.

**ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO**



WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
 ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ
 TADEUSZ HODAKOWSKI

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

Leo Turno: **Kompletny Podręcznik** estas sendata ĉiam tuj, en la sama tago, en kiu venas la mendo. Bonvolu noti la opajn prezojn (poŝtpago enkalkulita) (1 ekz. 1,25 zł):

5 ekz. — 5.—	10 ekz. — 9.50
20 „ — 18.50	30 „ — 27.—
50 „ — 45.—	100 „ — 85.—

Leo Turno: **Wyższy Kurs języka Esperanto** estas vendata (poŝtpago enkalkulita) (1 ekz. 2.— zł):

5 ekz. — zł 7.50	(anst. 10.— + poŝtp)
20 „ — „ 28.—	(„ 40.— „ „)
50 „ — „ 70.—	(„ 100.— „ „)

Czytanki esperanckie (w druku) cena zł. 1.50.

Pagu al PKO No 405.716, Kraków, aŭ al Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

Du 21 jaraj Anglinoj volas korespondi kun Polaj kaj Ĉeĥaj gejunuloj. Skribu al Fraŭ Marian Edge & School St. Rishton. Lancs. kaj Fraŭ Alice Holt. 45 Fairfield Ave. Waterfoot. Manchester."



TREŚĆ — ENHAVO:

T. HODAKOWSKI: PRI NIA LABORO. IMPRESOJ PRI LA IV TUTPOLA EN ŁÓDŹ. EL LA GAZETARO. LIDJA ZAMENHOF: LA ĈE-KURSO EN ARNHEM. DANKON SAMIDEANOJ! KOMUNIKOJ DE P. E. D. ODEZWA W SPRAWIE KSIĘGI ADRESOWEJ. 23-a UNIV. KONGRESO. DE ESPERANTO. BIBLIOGRAFIO. POLLANDA KRONIKO. BULTENO DE U. E. A.



POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIV JARO

KRAKÓW

Nr 10 N-o

PAŹDZIERNIK 1930 OKTOBRO

PRI NIA LABORO.

Propagando de Esperanto en nia lando lamas. Tio estas senduba vero kaj ne povas ĝin kontraŭdiri eĉ tiuj ĝojigaj faktoj, kiuj okazis en la lasta jaro, pruvante ke dormas ne ĉiuj, male, ke iuj eĉ laboras, se ne laboregas. Malgraŭ tio mi ne hezitas konfesi, ke ne ĉio tiurilata estas en plena ordo.

Jes, en nia laboro mankas ordo kaj precizeco. Ni ne scias plifaciligigi al ni niajn taskojn, aranĝi iliajn solvojn tiel, ke nia peno kaj fortostreĉo estu kiel eble plej fruktodona. La laboro ne estas organizita kaj racie dividita. Unu persono okupas sin pri multaj aferoj, ne sciante aŭ ne konante distribui ilian plenumon laŭ postuloj de moderna laborekonomio, kio kaŭzas lian troŝarĝigon per laboro, sekve jen pli jen malpli fruan malinklinigon for de Esperanto. Ni konas ja tiajn eks-Esperantistojn, kiuj nun tute ne interesiĝas pri la afero, konsiderante la movadon fantazio de utopiuloj. Ilia granda iam fervoro malaperis lasante malkontentecon kaj misguston. Ili estis ankaŭ idealistoj kredantaj pri nia bela estonteco, sed tamen flugiloj de ilia antaŭa entuziasmo malstreĉiĝis, ili revenis al senideala vivo. Ne ĉiam granda brulego daŭras tre longe. Se ekmankos fajronutra materialo, ĝi estingiĝas.

Kaj tiu nutra materialo estas konscio, ke oni ne estas izola forlasita kiel ermito sur forgesita insulo, konscio, ke oni havas laborremajn helpantojn pretajn interdividi ŝarĝon de vana kelkfoje semado, ke oni havas oferemajn laborkunulojn taŭgajn ne nur kritiki sed ankaŭ kunlabori. Alie la homo sentas sin kiel birdo en kaĝo, se ĝi estis kutima altenflugadi, eĉ en la kaĝo ĝi ne malemiĝas la samon fari, ĝi flugas batante la stangojn per flugiloj, ĝi baraktas, multfoje ripetante siajn penadojn, sed fine falas teren senforte kaj senspire.

Racia labordivido kaj organizita kunlaboro estu nia veksinalo por ĉiam! La labordivido ne estas disigo de fortoj. En ĉiu vivanta organismo ni renkontas ja tiun sistemon de laboro. Unuj ĉeloj destinitaj por iu celo plenumas nur sian taskon, aliaj ĉeloj alimaniere efektiviĝas sian devon, sed ĉiuj laboras por la sama celo, ĉiuj dependas de unu gvida centro. Sekvas specialiĝo en la laboro, malpli granda elspezo de fortoj, kaj la rezulto estas pli bona kaj pli evidenta.

Se tio estas al ni por ĉiam necesa, do tiom pli en la nuna jaro, en la jaro de antaŭpreparaj laboroj por la universala kongreso, kiu estos por ni, pollandaj esperantistoj, grava ekzameno de niaj organizkaj laborkapabloj. La ekzameno estos tiom pli severa, ke ni jam en malpli favoraj cirkonstancoj antaŭ dekok jaroj sukcesis bone organizi la okan universalan kongreson, do nun ĝi absolute ne povas esti malpli prospera.

La esperantista mondo rigardas kaj observas nin. Ek' al vigla, bone organizita laboro! La grupoj pripensu siajn laborplanojn por la komenciĝanta varbperiodo. Ni favorigu opinion de nia socio por Esperanto. La socio ne estas kontraŭa por la afero. Ĝi estas kelkfoje malbone informita, — ni ĝin konsciigu!

Por efike alparoli la socion, por ĝin konvinki pri pravenco de nia ideo ni devas aperigadi bone verkitajn propagandajn artikolojn. Sed ne ĉiam samfacile estas enpenetri sur la ĵurnalan kolonaron, ĉar ĝis nun nur malmultaj redaktoroj rekonas valoron de Esperanto. Tial ni devas aperigadi monatan revuon dediĉitan al la propagando de Esperanto inter pollingvanoj. Tiucele ni bezonas ofereman helpon de ĉiuj esperantistoj en Polujo. Ni faris prikalkulon de kostoj. Se ni sukcesos disvendi monate 2000 ekzempleroj po 20 groŝoj, tiam ni povos komenci la eldonadon. La gazeto estus 4-paĝa. Ĝia dimensio 47 × 32. Preso 4-kolona.

Samideanoj kaj samlandanoj pripensu! Se ĉiu esperantisto sukcesos disvendi nur 5 ekzemplerojn, tiam ni bezonus nur 400 volontulojn, kiuj prizorgus la disvendon. Ekzistas ja societoj en Polujo, kiuj posedas po 200 membroj, do anoj de nur du societoj povus kontentige decidi pri efektiviĝo de nia propono. Kaj se aliaj societoj tion subtenos tiom pli bone. La ekzisto de la revuo estos certega.

Mi scias, ke ekzistas samideanoj, kiuj volonte elspezos kelkan monon por la propagando. Ili mendos kelkajn ekzemplerojn de la revuo, por donaci ilin al siaj konatoj ankoraŭ ne-esperantistoj, aŭ dismetos ilin en kafejoj, restoracioj, kuracistaj kaj aliaj atendejoj en tramveturiloj ktp., por enpenetri en ĉiujn tavolojn de la socio. Same kiel unuopaj esperantistoj agos ankaŭ grupoj kaj societoj, kiuj preskaŭ ĉiam disponas iajn monrimedojn por la propagando. Konsiderante tion mi firme kredas, ke ni sukcesos la revuon eldonadi sen deficito. **Por tion realigi ni atendas deklarojn de ĉiuj societoj en Polujo kaj de ĉiuj izolaj esperantistoj pri kvanto de bezonataj ekzempleroj.** Gesinjoroj estraranoj kaj speciale sekretarioj bonvolu la aferon voĉdonigi kaj doni al ni respondon ĝis fino de la oktobro!

Tiuspecan revuon Pola Esperantisto ne povas anstataŭi, ĉar ĝi estas preskaŭ ekskluzive redaktata en Esperanto, kiel destinita en certa kvanto por eksterlando, kaj tio speciale nun estas severe observata, kiam P. E. fariĝis la organo de L. K. K. al la Krakova Kongreso.

Kaj fine lasta argumento: en junia numero de P. E. aperis malgranda mencio, ke en la redakcio estas riceveblaj kelkaj pollingvaj artikoloj aperigindaj en ĵurnaloj. Kontraŭespere alvenis tiom multaj postuloj por havigi la artikolojn, ke pro manko de sufiĉaj kopioj ne estis eble kontentigi la petojn de ĉiuj, kiuj tion deziris. La afero estas tute komprenebla. Ekzistas ja multaj personoj, kiuj kvankam povus

prizorgi enpreson de propagandaj artikoloj, tamen ne havas tempon por ilin verki, aliaj ne havas por tio kapablojn. Se ni havus specialan propagandan revuon, la laboro estus tre faciligita. Sufiĉus nur kopii konvenan artikolon por prezenti ĝin al iu redakcio de pola gazeto. Tiamaniere unu artikolo povus esti presata en kelkaj ĵurnaloj. La sama artikolo estus multe pli efika, ĉar pli vaste diskonigita. Jen nova argumento, ke tian revuon ni nepre bezonas.

Do *Gesamideanoj!* ne hezitu kaj ne prokrastu, sed tuj sciigu kiom da numeroj vi bezonos — nia tasko estos plenumi vian postulon.

T. Hodakowski.

IMPRESOJ PRI LA IV TUTPOLA EN ŁÓDŹ.

LETERO DE ĈEESTINTO.

Kara Amiko.

Vi ne volis veni Lodz'on al la nunjara Tutpola Kongreso, ne kredante je sukceso en la „malbonfama“ Łódź. Vin cetere neniam niaj landkongresoj kontentigis. Laŭ vi ili ne plenumis sian mision: ne nur havigi al la partoprenantoj kelktagan esperantistan ĝojon, sed ĉefe elvoki kongresan agordon en la urbo mem, fariĝi impona propagando k. t. p. Mi devas konfesi, ke veturante al Łódź, mi mem sentis ioman timon tiurilatan, sed nun mi kun ĝojo konstatas, ke mi trompiĝis en mia malfido, ĉar la Lodza Kongreso plene sukcesis ĉiurilate. Bona organizo, videbla sur ĉiu paŝo, en ĉiu aranĝo, kontentigis ĉiujn, eĉ la kutime grumblantajn samideanojn. Tiu kontenteco ripozis sur ĉies vizaĝo dum la tuta daŭro de l' kongreso kaj vi povas nur bedaŭri, ke vi ne partoprenis en nia ĝojo.

Laŭ nombro de ĉeestintoj la kongreso same sukcesis: ĉ. 300 aliĝintoj svarmis en akceptejo, 25 urboj estis reprezentataj. Malnovaj amikoj, fidelaj pioniroj en bonhumora babilado rakontadis siajn spertojn, novaj fervenculoj prezentis sin por batalo. Unuvorte: regis kongresa agordo, ĝuste tio, kio tiel ofte mankis ĝis nun en niaj landkongresoj.

Kvankam oficiale la kongreso komenciĝis nur sabate, la 20-an de septembro, tamen jam vendrede de mateno regis la „kongresa bruo“, dum tuta tago alvenadis *gesamideanoj* el malproksimaj regionoj de nia lando. Tuj ĉiu ricevis la kongresajn dokumentojn, kiuj jam estis preparitaj. Vespere alvenis la „*eminentuloj*“: *gesinjoroj* Feliks Zamenhof, F-ino Lidio Zamenhof, Prof. Dro Bujwid k. a.

En ambaŭ stacidomoj de la urbo estis elmetitaj grandegaj afiŝoj, anoncantaj la adreson de l' akceptejo (domo de Urba Konsilantaro). Cetere la alvenintoj ne havis la bezonon serĉi similajn anoncojn, ĉar antaŭ alveno de ĉiu vagonaro atendis lodzaj esperantistoj.

Vespere la akceptejon plenigis ĉ. 100 personoj, partoprenintoj en la ekskursoj el Varsovio, Białystok k. a. Post prizorgo de la dokumentoj, ĉiuj estis direktitaj en komunajn loĝejojn, kie oni ne nur senpage tranoktis, sed dank' al malavareco de lodza samideanino, deziranta resti anonima, ĉiuj ricevis ankaŭ matenmanĝon.

Sabate matene okazis tre interesa vizitado tra fabrikejoj de la mondfama „Widzewska Manufaktura“. Estas neeble en kelkaj vortoj priskribi la grandiozecon kaj gigantecon de la tieaj instalaĵoj, okuloj devas tion vidi kaj admiri. Tio daŭris ĝis la unua horo tgm. Post komuna fotografado sur fabrika placo ĉiuj veturis al restoracio „Rogów“ al la komuna tagmanĝo.

Nun proksimiĝis jam la solena malfermo de l' kongreso kaj mi volas antaŭ ĉio diri al vi, ke ĝi superis ĉies imagon kaj esperon. La organizintoj zorgis por fari ĝin kiom eble plej solena kaj impona kaj ili sukcesis. En la belege ornamita salonego de Lodza Urba Konsilantaro kolektiĝis ĉ. 400 personoj, i. a. reprezentantoj de Registaro, Magistrato, Juĝejo, polico k. t. p. Salonego plenplena. Pro manko de sidlokoj multaj staras. Spiritita streĉo — grandega. Ĝis fine sur la estrado aperas nia multe-ŝatata bonkora prezidanto de P. E. D. Prof. Dro O. Bujwid kaj malfermas la kongreson. Li salutas la reprezentantojn de l' Vojevodo, Magistrato, diversaj sociaj organizaĵoj kaj gazetaro kaj diras koran bonvenon al ĉiuj esperantistoj. En belaj vortoj li konstatas kun ĝojo, ke Esperanto en Polujo marŝas konsiderinde antaŭen, kaj esperas, ke komuna kunlaboro povos nur pliproksimigi nian venkon. Tondraj aplaŭdoj de l' publiko sekvas la paroladon de l' Profesoro, kiu tuj poste invitas la jenan estaron de l' kongreso: Prezidanto — Dro J. Mędrkiewicz (kiu siaflanke invitas forte aplaŭdatajn Prof. Bujwid kaj s-on Feliks Zamenhof kiel honorajn prezidantojn), estraranoj: F-ino Lidio Zamenhof, s-oj J. Tichawski kaj St. Karolczyk. Sekretarioj: s-ino E. Czelicka, s-oj Czesław Pruski kaj I. Lejzerowicz.

En momento, kiam s-o Prof. Bujwid elkrias kun akompano de l' publiko vivuon por la Prezidanto de l' Republiko, 20-persona orkestro, kaŝita sur balkono, ekludas la Nacian Himnon, kiun la tuta kunvenintaro, starante aŭskultas.

Sekvas parolado de l' kongresa prezidanto, Dro J. Mędrkiewicz. Li pruvas la sciencan valoron de Esperanto (en Esperanto kaj pola lingvo) konstatas la superecon de nia idiomo rilate al aliaj sistemoj kaj alvokas al ĝia praktika uzado. Post tiu tre interesa parolado la orkestro ekludas la esperantan himnon, kaj la lampoj en la salono lumiĝas.

Tondraj aplaŭdoj eksplodas, kiam ekparolas s-o Feliks Zamenhof, frato de l' Majstro. Li ne dubas pri nia fina venko. La nuna kongreso demonstracias potencon, kiu — li esperas — pli kaj pli kreskos. Fine s-o Zamenhof alvokas ne nur al la koro, sed ankaŭ al la poŝo. Movado bezonas monon, sen ĝi grandskala agado estas nebla.

F-ino Lidio Zamenhof jam estas konata al la tutmonda esperantistaro pro sia oratoreco. Uragano de aplaŭdoj ekskuas la salonon, kiam do ŝi stariĝas por alparoli la kongresanaron. Ĉi-foje ŝi elektis sia temo la simbolan fakton, ke en momento, kiam la orkestro ekludis nian himnon, el la multaj lampoj kaj ĝirandoloj de l' salonego verŝiĝis lumo kaj brilo. Jen bona signo, bonaŭgura momento. Ŝi parolas pri la lumo de l' Verda Stelo kaj kaptas la verdajn korojn de l' amasa publiko. La parolado postlasis profundan impreson.

Sekvas la salutparoloj de la oficialaj reprezentantoj kaj delegitoj de E-societoj, post kiuj la prezidanto fermas la kunvenon.

Ĉirkaŭ la 7-a horo vespere la nelaciĝintoj aŭskultis ankoraŭ du interesajn paroladojn de Dro Czubyński kaj s-o Zawada. Tiujn mi bedaŭrinde ne ĉeestis, ĉar samhore Prof. Bujwid kaj Dro Mędrkiewicz parolis el la Lodza Radio-stacio kaj mi kun multaj aliaj sidis ĉe radio-ricevilo por „kapti“ la interesajn „radiojn“.

Vespere, post la oka, la kongresanaro komencis kolektiĝadi en la bele ornamitaj salcnoj de „Picadilly“, kie okazis la raŭto. Tie ni amuziĝis ĝis la 2-a horo nokte kaj eĉ tiam ne deziris hejmeniri. Oni tamen nin „elpelis“, argumentante, ke ni devas matene frue ellitiĝi por ĉeesti la malkovron de la Zamenhofa memortabulo.

Pri la raŭto mi nur volas diri, ke estis tro malvaste ĉefe pro tio, ke ĉiuj preferis troviĝi en la supera salono, kie ludis la orkestro kaj okazis la programo. Oni evitu estonte balon kongresan en tiel situita salonaro, ĉar finfine ĉiuj preferas la salonon kun muziko kaj... gajeco. Ankaŭ oni estonte zorgu pri pli bonaj ĝentilaj kelneroj.

La bonegan programon plenumis ĝesamideanoj: Sowiński. Zimmels kaj F-ino Bertig el Kraków, s-o Halperin kaj F-ino Porozowska el Białystok, s-o Korman, Joachimowicz kaj Liberman el Łódź.

Dimanĉe matene, malgraŭ la pluva vetero kaj malgraŭ la malpermeso de l' polico kaŭze de la antaŭelekta periodo, aranĝi grandan amasan kunvenon subĉielan dum la malkovro de l' Zamenhofa memortabulo, ariĝis ĉ. 150 personoj en angulo de stratoj Piotrkowska kaj Zamenhofa (centro de l' urbo), pliĝuste antaŭ domo Zamenhofa 1, kie estis enmurigita granda tabulo (formato 1.20 m. × 0.80 m.), havanta en pola kaj esperanta lingvoj la jenan tekston:

Al Dro L. L. Zamenhof,
Aŭtoro de internacia lingvo
Esperanto,
nask. en Białystok en 1859,
mort. en Varsovio en 1917

IV Tutpola Kongreso
de Esperanto
en Łódź

Łódź, en septembro 1930.

Inaŭgurante la tabulon, Prof. Bujwid dankis al la Lodza urbanaro pro tiu belforma esprimo de simpatio al nia Majstro, kaj gratulis la Lodzan esperantistaron pro akiro de tiel impona memoraĵo. En nomo de Lodzaj Esperantistoj respondis al Prof. Bujwid Dro Mędrkiewicz. Post tiu soleno la kongresanoj disiris al diversaj fakaj kunvenoj. En salonoj de Lodza Kuracista Ĉambro kunvenis ĉ. 20 E-istaj kuracistoj por aŭskulti interesajn prelegojn de Prof. Bujwid kaj Dro Goldbaum pri vitaminoj. Sekvis bankedo en ekzakta rondo, donita de Dro Seliwanow.

Dume, en apartaj salonoj de la Urba Konsilantaro kunvenis grandnombre studentoj, Laboranoj kaj U. E. A.-anoj. Post longaj debatoj, kaŭzintaj vicon da rezolucioj, ĉiuj denove kune iris al la komuna tagmanĝo.

Post tagmanĝo mienoj malsereniĝis. „Kongresa ĝojo kuras for, nun restos sole rememcr“. Jen ni ĉiuj kunvenis en la lasta, ferma kunsido de l' kongreso. Sed nun niaj amikoj havis plej bonan okazon por disvolvi sian oratoran kapablon. Oni ĝoje akceptis la sciigon, ke

de nun Pola Esperanto Instituto fariĝas organo de P. E. D. — Oni forsendis homagiajn telegramojn al Lia Moŝto, Prezidanto de la Respubliko, al ĉefministro Marŝalo Piłsudski, al Ministro de Ekstero kaj Interno, kaj al Ministro de Klerigado. Fine disvolviĝis arda diskutado pri la Sciencpolitika Sekcio ĉe Lodza Esperanto-Societo. Abundis streĉaj interesaj momentoj ĝis fine oni decidis transplanti la sekcion en P. E. D., lasante tamen ĝian sidejon en Łódź sub plua gvidado de meritplena Dro Mędrkiewicz.

Fine s-o Tichawski en nomo de Magistrato de Katowice invitas en tiun urbon la venontjaran V-an Tutpolan Kongreson, kiu okazos precize antaŭ la Tutmonda en Kraków. Ĝoje kaj forte aplaudante la samideanaro akceptas tiun inviton. Tiam stariĝas prof. Bujwid, kaj dankinte al la organiza komitato pro la faritaj laboroj, fermas la kongreson. Oni kantas la himnon kaj kun ĝojaj ekkrioj: „Ĝis revido en Katowice kaj Kraków“ oni malĝoje forlasas la kongresejon. Multaj amikoj jam rapidas en stacidomon, plimulto tamen restas por pasigi ankoraŭ liberan kunvenon en kafejo „Louvre“ ĝis malfrua horo. Fine ĉiuj devis ja disiri. Tiel do pasis belaj tagoj en Łódź. Agrablaj impresoj akompanis nin ĉiujn. Lodza kongreso estis vere granda kongreso. Ni esperu, ke la rikolto postkongresa estos granda. Entute mi rimarkis, ke en Łódź Esperanto ĝenerale estas favorata. La gazetaro favore raportis pri la kongresaj aranĝoj, kaj en „Głos Poranny“ en la unua kongrestago aperis eĉ esperantlingva salutartikolo.

Finante, mi ankoraŭfoje diru al vi, ke vi povas nur bedaŭri, ke vi ne ĉeestis la belan kongreson en Łódź.

Amike via N. N.

EL LA GAZETARO.

Interesan artikolon publikigas en L' Eclairer du Soir s-ro Florens Barker, respondante al la letero de s-ro C. Vautel, laŭ kiu la lingvo angla estas destinita por iĝi lingvo tutmonda. Jam nun preskaŭ tuta nia generacio estas devigata pagi al New York la postmilitan miliardon da dolaroj (franca ŝuldo). Kvardek ŝtatoj jam protestis kontraŭ la amerika dogano. Ĉu estas eble post la aĉeto pere de angloj kaj amerikanoj de niaj kasteloj, teatroj, akcioj kaj kinematografaj vendi al ili ankaŭ niajn cerbojn?

Memkompreneble oni ne plu parolos pri la akcepto de la franca lingvo.

Kio do restas? fari nenion, kiam kontraŭ sesdek miloj da france parolantoj staras cent kvindek milionoj da parolantoj angle?

Ĉu ne restas unika defendilo kontraŭ tiom granda danĝero — la lingvo, sen iu ajn nacia influo, ligilo inter nacioj tute neŭtrala, por neniu ofendema.

En junia n-ro de Rivista Italiana di Esperanto aperis tre interesa artikolo, verkita de s-o G. Facchi, sub titolo: „L' Esperanto in Polonia“, en kiu la aŭtoro prezentas multajn ligilojn de nia lando kun Esperanto kaj ĝia historio, malkaŝante bonan konon de la temo. Kun granda ĝojo ni legis la artikolon kaj speciale partojn rilatantajn al polaj literaturo kaj historio. Ni sentas nin tre feliĉaj danki publike al s-o Facchi pro la aperigo de tiu artikolo.

deptak	56	długość
•deptak trotuaro, irejo, promenirejo, tredirejo, promenvojo		dezelować detruī, difekti
•deputacia legacio, deputitaro, petsenditaro		dezertować dizerti, eksigi, forigi, forkuri, fuĝi
•dereñ ŝvidwa sangkornuo (bot.)		dezorganizacja malorganizo, misorganizo, (desorganizo w słowniku Grab. przekreślić)
•dermatolog dermatologo, haŭtkuracisto		•dezynfekcia antisepsado
•descendent posteulo, ido (potomek)		dezynfekować dezinfekti
•deska lato (wąska lata)		dielektryczny dielektra, dielektrika
•deski sceniczne scentabularo		diluwjum diluvo
•despekt ofendo (obrazo). humilogo (poniżenie)		•djabel satano, malbona spirito
•despotyczny absoluta, imperiema, absolut-eca, -ema, tiraneca, arbitra,		diak diako
•destrukcia detruo, desorganizo		djuna duno, djuno (wydma)
•destrukcyjny desorganiza detruema, depravacianta		dławica krupo, angino (med.)
•deta orkiestra blovorkestro, blovinstrumentarostro, blovistaro		dławiduda muzikistaĉo, fuŝmuzikanto
•detektor detektoro		•dłoń palmo (anat.), mankavo
•detektyw detektivo, intimulo		dłoniówka manpilko, puŝpilko
•determinacja determino		•dłubać majstrumi (majstrować), fingrumi (manipulować palcami), manmajstri, manipuli
•detronizować sentronigi		•długi longtempa
•devaluacja malplivalorigo, valorperdo		długodziób longbeka mergo (zool.)
•dewastacja detruo, ruinigo		•długość longitudo geogr.). ondolongo (dł. fali)
•dezawuować malaprobis, kontesti, nei		

czaprak	49	czerep
•czaprak selkovrilo, subselajo		•czasowy tempa, iomtempa (chwilowy), dumtempa (przez pewien czas), anstataua (zastępujący)
•czar sorĉajo, magio		•czasza bovlo (misa); czasza kulista unubaza zono (mat.)
•czara bovlo (czarka)		•czasza cerbujo
•czarci satana		•czatować rabatendi
•czarcie lajno asafetido (asant, smrodzieniec)		czaber dorsajo, dorsparto, dorsviando
czarka bovlo, pokalo, kaliko, vaso		•cząstka ero; cząstkowy popeca; partitiva (gram.)
czarna katarakta (med.) amaŭrozo		•czczość vanteco
•czarowny sorĉiga, mirinda, ĉarma (cudny)		•czyży sobra, en sobra stomako, banala
•czart malbona spirito, belzebubo		•czekać deziratendi (oczekiwać z upragnieniem), minacatendi
czarujący ĉarma, rava, magia (p. cudny)		czekać z groźbą), minaci (grozić)
czary sorĉo, sorĉajo, magio, ravo		czekan ĉekano, ĝagano
•czas justempo, ĝustomento (chwila właściwa), neceso (potrzeba)		•czekoladka pralino
•czasami, czasem kelktempe, kelkfoje, kelkiam		czem — tem ju — des
•czasem pli poste (później), baldaŭ (wnet), iom post iom (potrosze), per si mem (samo przez siebie)		czemiernikowe heleboro (bot.)
czasokres limtempo, tempoperiodo, tempospaco, epoko		czemierzyca veratro (bot.)
czasomiar ĥronometro		czepny alpendigema, al
czasopis ĥronolog(is)to		kroĉigema, rampema
		•czerep krevitajo (złom), vazrompajo (odfama-
		ne kawałki naczyń), rubajo (gruz), potaĉo (garnek)

czerniaczka melanozo
(czarne zabarwienie
tkanek w ciele, med.)
czernica grazyzna nukhu-
pa merganaso (zool.)
czerniczek motacelo
(zool.)
czernidlak lamliwy mice-
no (bot.)
czernidło ciro
czerniec kłosowy akteo
(bot.)
czernik (matwa) sepio
(zool.)
•czerstwieć malfreŝigi,
fortikiĝi
•czerw akaro, anobio
•czerwczaŝte skleranteoj
(bot. z goździkowych)
•czerwień o'owiowa mi-
nio (min.)
czervenica vakcinio
czervenidło ruĝiĝilo
czerwieniec anhuso (mio-
dunka), eritro (tysiacz-
nik), isato (uczet far-
bierski, (bot.)
•czzerwone włoski asple-
nio (bot.)
czerwonogon motacelo
(pliszka, zool.)
czcrwononosy ruĝnazza
czerwotok anobio
(z chrząszczy, zool.)
•część respekto

•część ero (częstka), fra-
zero (cz. mowy), parol-
parto (część przemó-
wienia), konsistafo,
komponaĵo (cz. składo-
wa), partaĵo, elemento;
ono (cz. całości, mat.)
•częściei pliofte, pliofto-
je, plifoje
•częściowy laŭparta, part-
korpa, popeca
•czesne lerneja paĝo, di-
daktrumo, enskribmo-
no
•częstokroć oftfoje
•częstotliwość frekven-
co (np. drgań elektr.)
•częstotliwy iterativa,
frekventativa (gram)
•częstować ĝastigi (go-
ścić), oferi (ofiarować),
ĝastregali (ugościć),
regalinviti (zapraszać
do poczęstunku)
•częsty multfoja, oftfoja,
kelkfoja
•czesuca ĉesuĉo (chińska
tkanina)
•cziczerone ĉiczerono
(przewodnik)
•czładać rampi, diedkla-
kaĉi, botklaki, klaktre-
niĝi (wlec się kłapiac)
•człekokształtny antropo-
morfa

•decymalny dekuma
podeka
deczko kovro, kovrilo
•defektivum defektivo
(gram.)
defensywa defensivo, de-
fendemo
defilada defilado. preter-
marŝo
•defilować defili
•definicja defincio
definitivny definitiva,
decid(ig)a (decydujący),
pozitiva (pozytywny),
fina (końcowy), lasta
(ostatni), ekstrema
(krajowy), decidita
(zdecydowany), finfina
(ostateczny)), findecida
(zdecydowany lub de-
cydujący ostatecznie)
deflacja deflacio
deformacja deformato, de-
formato, misformato
defraudacja defraŭdo
defraudować defraŭdi
•dega bareltabulo, barel-
lato, barelstipo. kalo
•degenerować degeneri
•degradować senrangigi,
eksigi
deĝustować abomenigi,
malinklinigi
deizm dismo, deismo
dekalog dekalogo, Dia le-
ĝaro laŭ Moseo
•dekokt dekokto
dekoktować dekokti, sen-
kolumigi

•dekompletować senkom-
pletigi
•dekoracja dekoro, orna-
mo, honorigo (uczce-
nie), ordendistingo (wy-
różnienie orderem)
•dekorować dekori, or-
nami, honorigi, orden-
ornami
•dekorum dececo, konve-
neco
•dekret patento, brevo
(papieski)
•dekstroza dekstrozo (cu-
kier gronowy)
•dekstryna dekstrino
dekurja dekurio
dekurjon dekuriestro
delator denunciisto,
- anto
•delfin daŭfeno
•delicia delico, delicio
•delikatny subtila, di-
skreta, nerimarkeba
dementia dementeco
dementować dementi
demobilizować malmobi-
lizi
demonstrować demonstri
demontować malmunti,
dispartigi
denat memmortiginto
•denervować denervi
denobilitacja malnobeli-
go, eksnobeliĝo
depresja deprimo, depre-
sio (geogr.)
•deptać tredi

wie — pripravolata (omawiany), jusa (właśnie ten), koncerna (dotyczący), jus gústa (właściwy)

•dar doto (posąg), lerteco (biegłość), talento (talent), kapabla (zdolność), ornamo (ozdobna), emo (skłonność)

•darcie w członkach artalgio

•darmo senprofite (bez zysku), senmone (bez pieniędzy), sensalajre (bez zapłaty)

•darń herbotavola

•darować abolicii (zmazać, umorzyc), cedi (ustąpić), rezigi (zrezygnować), indulgi (pobłażać), lasi (pozostawić)

•darwinizm darvinismo

•das grimaco, kaprico

•dasać się koiermieni (mieć gniewną minę), šajnkoleri (gniewać się pozornie, duonkoleri (gniewać się napół), grimaci (stroić grymsy)

•datować datumi

•dawać ssać sućigi

•dawkowany dozita (mierzony na doży)

•dawno delonge, plifruo (wcześniej)

•dawny longtempa, eksa (były), iama (dawniejszy), antikva (starożytny), praa (prastary), delonga (od dłuższego czasu)

•dążyć vojađi (podróżować), marši (maszerować), direktiđi (kierować się), pilđrimi (pielgrzymować)

•dbać gardi (strzec, pilnować),

•dbały garda (strzegący), gardema (pilny), observe (przestrzegający)

•dba stawać ekstariđi malantaũpiede, sovađsalti (dziko podskakiwać), obstinstariđi, stariđadi (postąpienie,

debet (winien) debeto, ŗuldo (dług)

•debetować debeti (obciążyć rachunek)

•debit debito (zbyt, pokup), detala ŗuldo, vendrajto (prawo sprzedaży)

•debjut debuto

•debjutować debuti

•decentralizować decentralizovať

(dech) co tchu tuj tuj, laũ ŗiuj fortoj

•członek artikoo (staw), peniso, pisilo, senatoro (cz. izby panów), senatoro (cz. senatu)

•członkonogi artropodoj, artikuloj, kondilopodoj (zool.)

•członkopromienne mala-kopterigioj (zool.)

•członowce entomostracoj, lofiropodoj (zool.)

•człowiek antropo, persono, iu (ktoś), oni

•czmychać ŗteforiri, ŗteforkuri, ŗteleliđi

•czoboty botegoj

•czołem bić prosterniđi, adori

•czołg rampaũtomobilo, tanko

•czołga likopodio (widłak, bot.)

•czołobitność prosterniđo

•czomber p. czaber

•czop bolto (belt, kolek), stultulo (głupiec)

•czopek bolto (kołek), ŗtopilo (zatyczka), boluso (med.)

•czort diablo, satano, belzebubo

•czosnaczek lekarski alianario (bot.)

•czosnak teũkrio (bot.)

•czosnek bulbo (cebula), skorodoprazo (cebulka rzana), cepo (cebula), ajlo, sativajlo (cz. właściwy), teũkrio (czosnek leśny), poreo (cz. pór, pory), ŗenoprazo (szczypiórek), askalniko (szalotka), fistulajlo (szalotka)

•czosnkować ajli

•czótenko bobeno, glitbobeno (w maszynie do szycia), navedo (czótenko u tkacza)

•czteroczłonkowe tetrameroj (zool.)

•czteroplytwowce fokoinoj (fokowate), pinipedioj (plytwonogi), nagilpieduloj (płetwonogie)

•czubatek hapalo (z małp, zool.)

•czubaty akentufo (bot.)

•czubek kresteto, supermezero, plenajo

•czubić się taũzi (targać za włosy)

•czuć tuŗi (dotykać), palpi (macać)

•czucie palpento, tuŗsen-to (uczucie dotyku), tuŗsenso (zmysł dotyku)

•czujny atentema (uważny), akresenta (bystry)

- *czyły sentema, plorema
piacziły), zorga (tro-
szczyący się), koreca
(serdeczny), karesa
(pieszczolliwy), delika-
ta (delikatny), influ-
ema (podatny dla wpty-
wów), kompatema
(współczujący), sento-
plena (uczuciowy), subi-
gema (poddający się),
palpitiğa (łechtliwy)
czupradło aćulo (brzy-
dal), sengustulo (bez-
gustu), taúzulo (powi-
chrzony), strangustuli-
no (kobieta z dziwacz-
nym smakiem), grote-
skulo (dziwak), ćapela-
ćo (kapeluszyško)
- *czupurny batalema
(skłonny do bójki),
agresema (agresywny),
p.ovokema (provokują-
cy), provokmiena
(z miną provokującą),
provokkutima (przy-
zwyczajony do prowo-
kowania), provokpreta
(gotów do provokacji),
batalpreta (gotów do
bójki)
- *czuwać ġardi (strzec),
observi (obserwować),
esti preta (być goto-
wym), esti atenta (być
ważnym), ġardestari
(stać na straży), ġarda-
tendi (czekać pilniując),
- ġardatenti (uważać pil-
niując)
czworaczy kvarġemela
(anat.)
*czworak kvarġošo
*czworobok, czworogran,
czworokąt tetragono
(mat.), kvarangulo
czworogranisty kvaran-
gula
czworoscián umiarowy
kvaradro, tetraedro
czyli aũ (albo), sekve do
(a zatem), tio signifas
(to znaczy), alivorte
(innym słowem)
*czyn akto; konduto (za-
chowanie się)
czyn karyġodny krimo,
punindaġo
czynić · odpowiedzialnym
respondeciġi
*czynnik koeficiento
*czynność funkcjado
(funkcjonowanie),
*czynny konstanta (sta-
ły)
*czyrak antrakso
(karbunkuł)
czyścić laksiġi (powodo-
wać przeczyszczenie)
ordigi (uporządkować),
kasti (kastować)
czyścić purgatorio
*czysto ekskluzive (wy-
łącznie)
czystopis neto, netskriba-
jo, pretskribaġo (gotow-

- we pismo), pretekzem-
plero (gotowy egzem-
plarz)
*czysty klara (jasny), ab-
soluta, mema (sam za
siebie)
- czysty dochód netġajno,
netprofito
*czytać skandi (metrycz-
nie)
czy też aũ ću

D.

- to się nie da ne sukce-
sos, ne estas eble, ne
cedos (nie ustąpi), ne
permesos (nie pozwoli)
*dać ebligti (umożliwić),
permesi (pozwolić)
dać się z bezokoliczni-
kiem — esti -ebla
dać się komus ulec, dać
się pokonać subiġi, ce-
di (ustąpić)
dać się słyszeć aũdigi
dać się sprowadzić esti
rekondukebla al
dać się stwierdzić esti
konstatebla
dać się unikać esti
evitebla
*dal distanco (odległość),
fordistanco (daleka
odległość) foro, forajo
dal ziemi apogeo (punkt
odziemny)
dalej pli for, multe for
(znacznie daleko), pli
antaŭen (dalej na prze-
- dzie), plu daŭre, daŭ-
rige (w dalszym cią-
gu), pli distanco
(w większej odległości)
*daleki distanca (w pew-
nej odległości)
dalja dalio (bot.)
dalmatyka dalmatiko
(część ubioru kapłań-
skiego) surpriso (strój
kobiet)
dalszy pia, pli malprok-
sima, pli distanca (w
większej odległości),
cetera (poza tem be-
dacy), plua
daltonizm daltonismo,
kolereraro, koloraste-
nio
damaszkować damaski
*dań, danina imposto
(opłata), dankdono
(dar w podziękę)
*daniel damantolupo,
damao (zool)
dany np. w danej spra-

LA ĈE-KURSO EN ARNHEM.

Delonge mi interesiĝis per la fama direkta metodo de la instruado de Esperanto, kies aŭtoro, pastro Andreo Ĉe, depost kelkaj jaroj vojaĝadas tra Eŭropo, farante netakseblajn servojn al Esperanto. En Edinburgo kaj Dancigo mi havis la okazojn aŭdi kelkajn apartajn lecionojn, do kun des pli granda ĝojo mi profitis la ĉi-jarajn aranĝojn kaj envoje al Oksfordo haltis por du semajnoj en Arnheim.

De la 17-a ĝis la 29-a de julio ni kunvenadis ĉiutage en granda lerneja ĉambro kaj refoje travivis tiun tempon, por kelkaj tiel malproksiman, kiam ni mem aŭdis la unuajn vortojn en Esperanto.

Ni venis, por aŭskulti la kurson de Esperanto. Sed s-ro Ĉe estis laca... vintre li laboris en Nederlando, poste kaptis lin la dresdenaj samideanoj... Kaj li senkulpiĝas humile, ke li ne faros kun ni **lecionojn**, li faros nur — **konversaciojn**. Kaj laŭ la unua regulo de etiketo, eltirante vizitbileton el sia paperujo, li prezentas sin:

„Mi estas Andreo Ĉe“.

Reciproka konatiĝo. Sed ne sufiĉas diri nur la nomon, necesas diri ankaŭ la profesion. Kaj jen la dua frazo:

„Mi estas pastro“.

Kaj la lernantoj, kiuj en la nombro de 199 plenigas la kursejon? Unu estas sekretario, alia komercisto, stenografia instruisto, lernej-inspektoro, studentino, mastrino de la Oolgaardt-domo, kie loĝas granda parto de la kursanoj.

Post la personoj venas objektoj, bestoj. La tabulo, la kreto, la tablo, ia besto — hundo ĉu kato? Kato, kato, absolute kato, certigas s-ro Ĉe.

Ĉar objektoj ludas grandegan rolon en la kurso de Ĉe. Oni devas memori, ke s-ro Ĉe ekzilas el la kursejo ĉiajn lernolibrojn, kaj anstataŭe enkondukas kaj civitanigas antaŭ ĉio tabulon kaj kretojn blankan kaj alikolorajn. La ruĝa kreto, per kiu li, „doktoro sur la nigra tabulo“, faras diversajn „operaciojn“! Kaj li prezentas al ni sian katon, sian hundon, li demandas pri niaj bestoj, kiaj estas ili, kiel fartas ili, ĉu ili ŝatas ĉokoladon?

Ho tiuj majstraj demandoj de s-ro Ĉe! La lernantoj tute perdas la konscion pri la leciono; kvazaŭ hipnotizaj ili ekkredas, ke ĉiuj demandoj de la instruisto estas kaŭzitaj nur de lia granda, eksterordinara, supermezura scivolo. „Forte, kuraĝe kaj elegante“ ili respondas, preskaŭ ne rimarkante, ke en la konversacion enŝtelas sin novaj vortoj, novaj formoj, novaj reguloj.

Sed s-ro Ĉe konscias kaj atentus. Li tenas la manon sur la pulso de la konversacio, li igas la lernantojn malkovri mem gramatikajn regulojn, kaj li mem kelkfoje intence faras erarojn aŭ forĝegas akuzativon, por esti korektita de siaj lernantoj.

Kio estas la sekreto de la sukceso de la Ĉe-kursoj?

S-ro Ĉe havas nenian talismanon. Li estas nur saĝa psikologo. Li scias, ke dum la kursoj, okazantaj ordinare vespere, kun homoj, lacaj post tuttaga laboro, la instruisto devas senĉese nutri la intereson de la lernantoj, igi ilin streĉi la tutan atenton kaj lasi ilin ne oscedi, sed ridi! Al tiuj ĉi principoj estas alkonformigita la tuta kurso. Kiu el la

kursanoj kapablos forgesi la vortojn: „ĉu la cigaro plaĉas al vi?“, se laŭ la „hispana etiketo“, la jesan respondon sekvas: „sinjoro, la cigaro apartenas al vi“. Kaj la cigaro efektive ekapartenas al la lernanto, kiu rajtas eĉ, se tio plaĉas al li, tuj ekfumi ĝin. Aŭ kiu forgesos la funebran lecionon, kiam s-ro Ĉe malfermis la ĵus alportitan al li nigrarandan koverton kaj en granda silento tralegis: „Kara amiko! Hieraŭ mortis (klarigo: estis, sed ne estas) mia... kato!“

La devizo de s-ro Ĉe estas: fari travivaĵon el ĉiu leciono, el ĉiu nova regulo. Kaj ne nur por la „kunikloj de la eksperimento“ — tiuj, kiuj ĝis nun tute ne komprenis Esperanton, sed ankaŭ por ni, malnovaj esperantistoj, la kurso estis ĉarma travivaĵo.

Mi bezonus multe da tempo kaj multe da loko sur la paĝoj de „Pola Esperantisto“, por dividi kun vi, karaj legantoj, ĉiujn miajn impresojn. Cetere ĉiaj rakontoj pri la Ĉe-kurso estas palaj kompare kun la kurso mem.

Mi deziras al vi, ke vi ĉiuj mem travivu tian kurson. La 23-a Universala Kongreso okazos en Krakovo. Kelkajn semajnojn antaŭe venos en la urbon la „granda homo kun malgranda nomo“ kaj laŭ la reguloj de etiketo prezentos sin al la lernantaro:

„Mi estas Andreo Ĉe!“

Lidja Zamenhof.

DANKON SAMIDEANOJ!

En junia n-ro de Pola Esperantisto ni enpresis artikolon sub titolo: „Pere de Esperanto...“, en kiu ni prezentis kelkajn faktojn, pruvantajn pri praktikaj servoj de Esperanto en internaciaj rilatoj. Lastaj tri ĉapitroj de tiu artikolo enhavis prezenton de komplezoj, kiujn plenumis kelkaj samideanoj tradukinte kaj prizorginte publikigon de la artikolo pri Jan Kochanowski en kelkaj nacilingvaj gazetoj. Ĉi sube ni konatigas pluajn faktojn.

S-o Schaden enpresigis en la ĵurnalo „Folha Nova“, n-ro 1.116, 7-an de julio, eldonata en Florianopolis, Brazilo, portugallingvan tradukon de la artikolo.

Oomoto — monata organo de Oomoto movado, kies redaktejo troviĝas en Kameoka, Kioto-hu, Japanujo, aperigis represon de la artikolo en sia 7 (59) numero de k. j.

S-o Holger Hansen en Holbäk, Ringstedvej 17, Danujo, tradukis kaj lokis la artikolon en la gazeto **Holbäk Amtstidende** en n-ro 299, 9-an de aŭgusto.

Narodni Noviny, gazeto eldonata en Brno, en sia n-ro 134, la 8-an de junio enhavas ĉeĥan tradukon de la artikolo plenumitan de s-ino A. Holancova.

La revuo **Mariborski Veĉernik**, aperanta en Maribor, Jugoslavujo enpresis la 21-an de junio, n-ro 139, slovenan tradukon de la artikolo. Nomon de la tradukinto ni ne konas.

Vegetarano — oficiala organo de la Internacia Vegetara Ligo Esperantista, Hamburg 24, Papenhundestr. 32. II. en junia n-ro enhavas mencion pri la artikolo.

En 28-a n-ro de **Heroldo de Esperanto** troviĝas originala artikolo pri Jan Kochanowski, verkita de kunlaboranto de la nomita gazeto.

Atendante pluajn informojn pri sorto de la artikolo en aliaj landoj ni dankas korege al ĉiuj Gesamideanoj supre nomitaj, kiuj bonvolis plenumi nian peton, tiamaniere grave helpante nin en nia propaganda laboro. Samtempe ni atentigas, ke la afero ankoraŭ ne malaktualiĝis. ĉar jubileo de Jan Kochanowski daŭras la tutan kuran tan jaron.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Ni publikigas ĉi sube bilancon de la IV. Tutpola Kongreso de Esperanto en Łódź.

ENSPEZOJ	Zł.	ELSPEZOJ	Zł.
Garantia Fondo	55·--	Kongresaj Kostoj	508·35
Kotizoj	1122·---	Zamenhofa Memortabulo	230·—
Loĝejoj (antaŭpagoj)	201·15	Presajoj	113·90
Tagmanĝoj (antaŭpagoj)	305·—	Loĝejoj	201·15
		Tagmanĝoj	305·---
		Raŭto	73·—
		Profito (P. E. D.)	251·75
	<u>1683·15</u>		<u>1683·15</u>

Prezidanto (—) Dr. J. Mędrkiewicz

Kasisto (—) J. Glicensztajn

Ĝen. sekretario (—) I. Lejzerowicz

Kontrolis kaj konfirmis revizia komisiono ĉe Lodza Esperanto Societo.

Al atento kaj pripenso de ĉiu unuopa samideano kaj de ĉiu grupo en Polujo ni prezentas la ĉefartikolon en la nuna n-ro de P. E. kaj speciale ĝian parton traktantan pri la eldonado de pollingva propaganda revuo. S-oj grupestroj kaj sekretarioj bonvolu helpi nin en nia laboro, prezentante siajn opiniojn pri la projekto, havigante al ni la petitajn deklarojn. Sed atentu, ke la afero estas tre urĝa, ĉar la varbperiodo jam komenciĝis!!

ODEZWA

w sprawie

KSIĘGI ADRESOWEJ ESPERANTYSTÓW POLSKI.

Praca nad przygotowaniem materiału do księgi posuwa się coraz dalej i coraz lepiej, zainteresowanie u ogółu esperantystów jest duże, a dotychczasowy stan i tempo wpłat tytułem abonamentu zgóry pozwala nam na podzielenie się z Szan. Czytelnikami radosną informacją, że „Księga” ta obejmie nietylko tych, którzy wpłacą zgóry abonament, lecz **wszystkich**, którzy tylko nadesła deklarację lub których stowarzyszenia esp. w Polsce redakcji „Księgi” jako esperantystów podadzą. (Jest to jedyna zmiana, jaka zachodzi w tekście rozsyłanego obecnie do wszystkich esperantystów w Polsce „Prospektu” w sprawie Księgi.)

Tem usilniej nadsyłanie abonamentu zgóry (2.— zł.) zaleca się wszystkim we własnym interesie, ponieważ po wyjściu z druku cena książki będzie znacznie wyższą. Również zwraca się uwagę, aby deklaranci wypełniali liczniej niż dotąd także drugą część „Deklaracji” dla celów centralnej kartoteki esp. przy PED., (rubrykę „Dane dobrowolne”), gdyż to finansowo ich w niczem nie zobowiązuje, jeśli na deklaracji nie jest zaznaczone, aby te „dane dobrowolne” drukiem ogłosić. Zaś do celów statystycznych są one bardzo potrzebne.

Stowarzyszenia grupy esp. w Polsce proszone są o przyspieszenie nadsyłania spisu swoich członków i zgłaszania ryczałtowej prenumeraty na książkę w cenie 2.— zł. za egz. za pobraniem pocztowym po wyjściu książki z druku. Dotychczas jeszcze nie wszystkie ugrupowania spełniły swój wobec tej ważnej ogólnoesperanckiej sprawy obowiązek! — a pisanie listów i upomnień ze względów oszczędnościowych i czasu jest niemożliwe.

Niech ani jednego esperantysty polskiego w „Księdze” tej nie zabraknie! Międzynarodowemu Kongresowi Esperanckiemu w Krakowie pokażmy na przyszły rok naszą liczebność, siłę i zwartość organizacyjną, która dzięki „Księdze” wzrośnie niepomiaralnie!

Z esperanckim pozdrowieniem
Redakcja „Księgi Adresowej Esperantystów Polski”
Warszawa, Miasto-Ogród Czerniaków, ul. Zaciszna 2.
m. Jana Zawady.

PS. Kto jeszcze nie otrzymał „Prospektu” książki, niech zaraz napisze na powyższy adres!

23-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kraków 1-a ĝis 8-a de Aŭgusto 1931.

BULTENO N-o 1.

15 OKTOBRO 1930.

Adreso por leteroj: Universala Kongreso de Esperanto, Kraków, Lubicz 34.

Generalaj sciigoj: Prepariĝas listo de honora kaj labora komitatoj, kiun en sekvonta bulteno ni povos konatigi. Espereble ni povos jam ankaŭ prezenti skizon de kelkaj kongresaj aranĝoj celantaj plifaciligi kaj agrablighi ĉeeston al la kongreso. Estas substrekinde, ke same la urbestro kiel la registaro tre favoras aranĝon de la kongreso en Kraków, kio rezultigos multajn avantaĝojn por la partoprenantoj. Aligoj al la kongreso jam alvenas; ĉi sube ni prezentas la unuan liston.

1. Scherer Jos. R., 612 Spring Street, Los Angeles, Usono.
2. Warden John Mabon, Cluny Drive 41, Edinburgo, Skotlando.
3. Philippet, Doktoro, Soufflot 15, Paris V-e, Francujo.
4. Pirchan Paula, s-ino, Waidhofen a/d. Th., Aŭstrio.
5. Onnen M. T., Ing., Nachtengaallaan 6, den Haag, Nederlando.
6. Kennedy David, Braigpark 60, Glasgow, Skotlando.
7. Cseh Andreo, Oostduinlaan 32, den Haag, Nederlando.
8. Isbrücker J. R. G., Ing., Oostduinlaan 32, den Haag, Nederlando.
9. Isbrücker Julia, s-ino, Oostduinlaan 32, den Haag, Nederlando.
10. Bujwid Odo, D-ro, prof., Lubicz 34, Kraków, Polujo.
11. Tiard Marcelle, s-ino, 11 rue de la Procession, Paris XV, Francujo.
12. Gueritte Tony Jules, Ing., Claremont Gardens 11, Surbiton, Anglujo.
13. Baird Jane, f-ino, Bellevue 95, Edinburgo, Skotlando.
14. Wrześniewska de la Bruyère E, s-ino, 5 Salem Mansions, London W 2 Anglujo.
15. Meyer Ernst, D-ro, Dudweilerstrasse 9, Saarbrücken 3, Saarteritorio.
16. Robertson Robert, Alexandra Park Road 364, Wood Green 22, Anglujo.
17. Blaise Paul, Manov Way 47, North Harrow, Anglujo.
18. Blaise Margaret L., s-ino, Manow Way 47, North Harrow, Anglujo.
19. Le Brun Paul, 5 Parliament Hill Mansions, Highgate Road, London, N. W. 5, Anglujo.
20. Le Brun Gertrude, s-ino, 5 Parliament Hill Mansions, Highgate Road, London, N. W. 5, Anglujo.
21. Gregg John Robert, 270 Madison Ave, New York City, U. S. A.
22. Patai Samuels, D-ro, VII Wesselényi 32, Budapest, Hungarujo.
23. Patai Georgine, s-ino, VII Wesselényi 32, Budapest, Hungarujo.
24. Krieger Jeanette Elisabeth, s-ino, Buys Ballotstr. 70, s' Gravenhage, Nederlando.
25. Neuberg Julja, s-ino, Wielopole 9, Kraków, Polujo.
26. Hub Franz, Friedhofstrasse 14, Gablonz a. N., Ĉeĥoslovakujo.
27. Fasce Ettore, Cesare Cabella 22/12, Genova 103, Italujo.
28. Hermelin Emilja, f-ino, Leszno 54, Warszawa, Polujo.
29. O' Brien Elizabeth, f-ino, Bouverie Road 10, Stoke Newington, London, N. 16, Anglujo.
30. O' Brien Susanna Greves, f-ino, Navarino Road 50, Worthing, Anglujo.

BIBLIOGRAFIO.

Frateto kaj fratineto de Fratoj Grimm kun fina traduko de i-ino A. S. Guŝano. Eldonita de La Verda Librejo, S-ro A. A. Sofio, 954 Chaoufoong road, Shanghai, China.

Malgranda, 28-paĝa libreto enhavanta la konatan fabelon en esperanto sur maldekstraj paĝoj kaj en fina lingvo sur dekstraj. Tre bona metodo permesanta en agrabla maniero interkonatiĝi kun esperanto al ĉinlingvanoj. Ni supozas ke ili ĝoje akceptis aperon de tiu libreto tiom pli, ke ĝi aspektas bele, presita sur bona papero kaj nur malmultaj prezeraroj estas troveblaj.

Du fabeloj de Fratoj Grimm, esperantigis A. Degen. Esperanto-Junula Biblioteko, N-ro 1. Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo. Paĝoj 24. Prezo 0.30 RM.

Diris al mi siatempe unu el miaj konatoj rigardante diversajn Esperanto-librojn, ke plej multe ĉe tiuj plaĉas al li, ke ili estas tiel pedante eldonitaj, kaj ĉiu libro jam per sia eksterajo faras tre bonan impreson. Jes, li estis grandparte prava, sed li ne sciis, kiel neesperantisto, ke tio precipe rilatas la librojn eldonitajn de Heroldo de Esperanto, kiu ĉiam klopodas pri ilia plenalloga aspekto. — La nomita libreto enhavas du fabelojn, el kiuj unu estas la sama kiel la supre priparolita fina libreto, kaj la alia parolas pri la konata „Rugĉapeto“. — Preso plenzorga, paĝoj posedas larĝan marginon por notoj, ĝenerala aspekto ĉarma.

Theta.

POLLANDA KRONIKO.

BYDGOSZCZ. Formiĝis organiza komitato fondonta „Polan Esperantistan Asocion“. En novembro komenciĝos kurso de la lingvo.

KATOWICE. La Mondlingvo-eldonejo malfermis la 30/9 1930 Esp.-kurson kun 27 partoprenantoj. La kurson gvidas s-ano J. Tichawski laŭ konversacia metodo.

KRAKÓW. „Ilustrowany Kurjer Codzienny“ de 27. IX. enhavis artikolon de s-o Szapiro s. t. „Ĉu Esperanto estos rekonita oficiala lingvo internacia?“ En alia n-ro aperis raporto pri la kongreso en Łódź kun fotografiaĵo. — En oficiala organo de Krakowa Lerneja Distrikto aperis alvoko pri Esperanto stimulant la ĝeinstruistaron al interesiĝado pri la lingvo precipe pro la okazonta venontjare universala kongreso kaj internacia Ĉe-kurso.

KRÓLEWSKA HUTA. La 4 IX okazis monata kunveno. S-o dro Broder faris per varmaj vortoj memorparoladon pri la mortinta s-ano dro med. Siano-żęcki, en kiu la Rondo kaj la Ligo Esp. perdis fervoran kunlaboranton kaj subtenanton. Dro Broder parolis ankaŭ pri Oxforda Esp. kongreso kaj signifo de 23-a Universala kongreso en Kraków.

LUBLIN. La jurnalo ABC informas la 2-an de X pri la okazonta kurso de Esperanto. — En sino de P. E. A. — Filio en Lublin ekestis frakcio nomata „Liga Przyjaciół Esperanta“ (Ligo de Esperanto-Amikoj), kies celo estas kunigi ĉiujn simpatiulojn kaj favorantojn de E.-movado en Lublin. — Kiel „afergvidanto“ estas elektita arda samideano, membro de UEA S-ro A. Zorkraut, kiel lia helpanto kaj anstataŭanto S-ro Szajnman. — Nunmomente la Ligo enhavas 30 membrojn kaj tiu-ĉi nombro kreskas ĉiutage. Adreso de la Ligo estas „Kafejo Warszawska“ str. Krak. Przedmieście Nr. 60. — Kunvenoj okazas regule ĉiumerkrede je la 8-a h. vesp.

Dum la kunveno okazinta la 28. VIII. k. j. Delegito de UEA. s-ro Cz. Pruski rakontis pri siaj impresoj de vojaĝado tra Lida, Staro- kaj Nowo-Święciany, Wilno, Białystok kaj Warszawa.

En murŝranketo apud str. Krak. Przedm. pendas grandmezura afiŝo, anoncanta al vasta publiko pri la IV-a Pollanda Kongreso de Esperanto en Łódź.

LWÓW. Post la libertempo komenciĝis vigla movado en la Societo. Reveturante el Oxford s-o H. Rozmarynowski, kiu partoprenis en la teatra prezentado dum la XXII kongreso, raportis antaŭ multnombra aŭskultantaro pri la kongreso kaj donis provan lecionon laŭ Ĉe-metodo. La preleginto estis multe aplaudata. La X Orienta foiro donis okazon publike propagandi Esperanton. Aparta stando kun esperantajoj altiris vizitantojn. Koncizaj flugfolioj informis pri la evoluo kaj progreso de Esperanto kaj pri la venonta mondkongreso en Kraków. — La 11. IX. okazis prelego de s-o Felicjan Wittlin je la temo: „Pri uzo de Esp. en komerco, ekz. ĉe Lyona foiro“. Ĝi estis tre interesa. — La kurso gvidata de s-o Lewicki jam finiĝis kaj nune okazas kurso, kiun gvidas nia fervora samideanino f-ino Fruchtówna.

ŁÓDŹ. La ĵurnalo „Głos Poranny“ aperigis pollingvan kaj Esperantan artikolojn bonvenajn okaze de la IV Pollanda kongreso. Aperis ankaŭ ĝia detala programo. — „Neue Lodzer Zeitung“ enhavis longan raporton pri la okazinta kongreso kaj apartan artikolon pri la Esperanto-Muzeo en Wien. — Pri la kongreso raportis ankaŭ „Lodzer Tageblatt“ eldonata en juda lingvo.

PIASKI POD LUBLINEM. Novelektita Delegito de U. E. A. s-ro Florentyn Kotliński komencis laŭsisteman propagandon en instruistaj rondoj. Interrompita en junio kurso de Esperanto por 12 personoj rekomenciĝis.

TOMASZÓW LUBELSKI. Prof. Józef Żołnierz, kiu en ĉi tiu jaro instruas ĉi tie, kreis esperanto-rondon, al kiu jam aliĝis 100 lernantoj. Ankaŭ en la urbo montriĝis signoj de fervora interesiĝo pri nia lingvo.

WARSZAWA. En la ĵurnalo „Nasz Przegląd“ aperis artikolo de s-o Oskar Berman s. t. Signifo de Esperanto por la komerco kaj industrio. — La 25 IX okazis prelego pri Esperanto aŭdigita de f-ino Lidja Zamenhof. — La 29-an komenciĝis kurso de la lingvo aranĝita de la grupo „Konkordo“. — „Kurjer Czerwony“ n-ro 220 enhavis fotografajon de la kongreso en Łódź.

WIELKIE HAJDUKI. 3. 10. komenciĝis Esp. kurso por komencantoj — ĝelaboristoj; partoprenas 30 p. Gvidas s-o Kołodziej.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Śapiro, Lipowa 33, Białystok.

Konto ĉe PKO No 60.047.

OFICIALA BULTENO Nro 19.

JARKUNVENO DE POLA TERITORIO DE UEA. Dum la IV Pollanda Kongreso de Esperanto en Łódź okazis la 21-an de Septembro jarkunveno de pola teritorio de UEA konforme al la art. 27 de la statuto. Raporto pri ĝi aperos aparte en „Pola Esperantisto“ kaj „Esperanto“.

JARLIBRO 1930. La Jarlibro de nia Asocio por 1930 estis dissendita al ĉiuj pagintaj membroj la 2-an de Julio n. j. rekte de la presejo.

Membroj, repagintaj aŭ nove aliĝintaj post la 1-a de Julio, ricevis la Jarlibron tuj de la Ĉefdelegito.

NEREPAGINTOJ. Ĉiam ankoraŭ restos sufiĉa aro da nerepagintoj. La komunaj penadoj de niaj Delegitoj kaj de niaj konsciaj anoj por pligrandigo de la UEA-anaro en Polujo restos senfruktaj, se samtempe kun varbo de novaj membroj, parto da malnovaj malatentos la neceson realiĝi. Ni finis la pasintan jaron 1929 en Polujo kun nur 422 membroj, dum la pli malgranda najbarlando Ĉeĥoslovakujo havis 1337 membrojn de UEA!

Ni insiste petas pri kiel eble plej baldaŭa repago de la kotizo pro la jam alproksimiĝanta fino de la asocia jaro. Ĉiu repaginto ricevas tuj la membran banderolon, kuponaron por servoj, la Jarlibron kaj — se li aliĝas kiel MA- ankaŭ ĉiujn ĝis nun aperintajn numerojn de la gazeto „Esperanto“ por la nuna jaro. Kotizojn bonvolu pagi al via loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito (P. K. O. No 60.047).

MALKARA ABONO DE „POLA ESPERANTISTO“ Ni denove memorigas, ke MA rajtas dank' al speciala aranĝo aboni „Polan Esperantiston“ je favora prezo 5 zl. jare, anstataŭ 8 zl. Ĝis nun por la jaro 1930 eluzis sian rajton 83 MA. Mendojn direktu al la Ĉefdelegito kun indiko de via membronumero. Membroj, pagantaj nun la favoran abonon por 1930, ricevos tuj ĉiujn ĝis nun aperintajn numerojn.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Oktobro n. j. UEA havis en Polujo 382 membrojn (3 DM, 8 MS, 239 MA kaj 132 M), krom tio 1 Esp. Entr. Ni ricevis jam ankaŭ la unuan pagon de kotizo por la jaro 1931. Ĝoje ni koniĝas al niaj membroj, ke por la jaro 1931 tiel „plejfrupagis“ la filino de nia Majstro f-ino Lidja Zamenhof.

NOVAJ DELEGITOJ. Plezure ni notas la jenajn pluajn novajn Delegitojn: **CHELMNO** (Pomorze). D. Bronisław Radziński, instruisto, Korpus Kadetów Nr. 2.

GRODNO (Ŝanĝo). D. Natan Fridman, instruisto, ul. Bonifratska 11 lĝ. 6.

GRUDZIĄDZ (Pomorze). D. Ferdynand Neumeuer, redaktoro, Kościelna 27.

MŁAWA. D. Roman Sakowicz, juristo, Warszawska 65.

PIASKI LUTERSKIE. D. Florentyn Kotliński, instruisto.

Białystok, la 1. 10. 1930.

J. Śapiro, Ĉefdelegito de UEA.

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Wyszedł z druku

KOMPLETNY SAMOUCZEK JĘZYKA ESPERANTO

ze zbiorem wyrażen handlowych i radjowych,
ułożony przez p. S. Grenkamp-Kornfelda,

członka wszechświatowego komitetu językowego dla Esperanta, Paryskiego Towarzystwa Lingwistycznego, współautora najobszerniejszego Słownika i najobszerniejszej Gramatyki esperanckiej
z przedmową prof. A. Cotton, członka Paryskiej Akademii Nauk.

Cena (wraz z opłatą pocztową):

1 egz. — zł 1.25		25 egz. — zł. 22.—
5 „ — „ 5.—		50 „ — „ 40.—
10 „ — „ 9.—		100 „ — „ 75.—

Konto czekowe Nr. 400.821.

ESPERANTISTA VOĈO, JASŁO.

Libreja Fakoj de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS:

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.30
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatrajo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Baghy — Viktimoj	9.60
Baŭcki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio	1.30
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bcnnsels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Butler — Himnaro Esperanta	3.00
— Kantaro Esperanta	3.00
Campe — Robinsono Kruso	7.00
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Conscience — La leono de Flandrujo	11.75
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.25
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Czechowski — Podróż po świecie dostępna dla każdego	0.50
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20

Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krijoj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
— Kompletny samouczek jęz. Esperanto	1.25
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Herben — Malriĉa knabo, kiu gloriĝis	4.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ibsen — Imperiestro kaj Galileano	12.60
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10.	
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928	5.00
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929	6.00
Jaumotte — Belga Antologio, franca parto	10.00
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Norda vento; novelkolekto	1.30
Kenelm Robinson — Se grenereto	13.00
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912	0.80
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Malgranda terbiblio	2.00
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de Dro Zamenhof	2.60
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Poŝtkartoj (kun moto de Żeromski) 10 pecoj	0.50
Reymont — En fumejo de l' opio	1.20
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Staff — Aŭtunaj agordoj	1.00
Sapiro — Bahiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Siŝmanow — Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helplingvo	1.00
Slosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp.	5.00
Trochimowski — Kwestia języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	2.00
Vermuyten — Belga Antologio, franca parto	10.00
Wiesefeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10
Zawada — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.)	4.00

La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baharaĥ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, Stolarska 6.

